



# HEROLDO DE UTENA

Informilo de BET- 49, 07-07-2013, dimanĉo *N-ro 2*

## KUNLABORI PER ESPERANTO



La kreinto de la lingvo Esperanto Ludoviko Zamenhof, kiu dum kelka tempo loĝis en Litovio kaj ĉi tie prilaboris la unuan lernolibron de Esperanto, havis la celon plifaciligi la komunikadon inter homoj de diversaj nacioj kaj unuigi la naciojn de la tuta mondo. Liaj aspiroj realiĝas: Esperanto iĝis liganta ponto inter landoj kaj homoj, kiu helpas ekkoni kaj malkovri diversecon de kulturoj. La 49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kunvenigintaj pli ol 200 esperantistojn el dudeko da landoj baltmaraj kaj aliaj, tre diferencaj laŭ la kulturoj, lingvoj kaj tradicioj, ankoraŭfoje pruvas, ke ĉiuj partoprenantoj, ne gravas de kie ili venis, havas multon komunan: ĉiujn unuigas la samaj aspiroj, celoj, la sama forta volo ekkoni unu la alian kaj kunlabori, kaj la sama komuna lingvo, kiu dissaltigas murojn kaj vaste malfermegas la pordon al la mondo.

Mi kore salutas la organizantojn de la 49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj kaj la partoprenantojn, kunvenintaj en la aranĝo, vere grava al Utena kaj al la tuta Litovio. Mi ĝojas pro viaj fervoro, energio kaj entuziasmo, ebligantaj komunan kreadon de la lingva spaco, kiu instigas al perfektigo kaj permesas sperti profiton, liveratan de ĝi. Mi kredas, ke la renkontiĝo helpas ankoraŭ pli aktive disvolvi la kunlaboradon kaj efikan interagadon.

Mi bondeziras al ĉiuj partoprenantoj interesajn diskutojn, laboran etoson kaj longdaŭre memorindan

konatiĝon kun Utena kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Mi esperas, ke ĉi tiu renkontiĝo donacos al vi multajn impresojn kaj bonajn emociojn, kiuj instigos vin refoje veni al Utena.

Alvydas Katinas,  
urbestro de Utena

## LA PROGRAMO por la 8a de julio (lundo)

- 8.00 – 9.00** Matenmanĝo  
**9.00 – 10.00** Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj  
**10.00 – 11.00** Somera universitato. Petras Čeliaskas: “Kuriozaĵoj de la litova lingvo” (aŭd. n-ro 2-08)
- 11.00 – 12.00** Somera universitato. Aleksander Korĵenkov: “Historio de Esperanto”, prelego 2 (aŭd. n-ro 2-16)  
**12.00 – 13.00** Somera universitato. Stano Marček: “Rektmetoda instruado de Esperanto” (aŭd. n-ro 2-08)
- 13.00 – 14.00** Tagmanĝo  
**14.00 – 15.00** Somera universitato. Ed Robertson: “Kiel deĉifri nekonatan lingvon?” (aŭd. n-ro 2-16)  
**14.00 – 15.00** Lingva konsultado de litovaj esperantistoj. Gvidas Petras Čeliaskas (aŭd. 2-16)
- 15.00 – 16.00** Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj  
**15.00 – 16.00** Somera universitato. Alfredas Maruška: “Ĉu Vi bezonas vitaminojn?” (aŭd. n-ro 2-08)  
**16.00 – 17.00** Somera universitato. Dima Ševĉenko: “Esperanto-libroj en komputila kaj Interreta epoko” (aŭd. n-ro 2-16)  
**17.00 – 18.00** Somera universitato. Margarita Želve: “100 jaroj de la fama Esperanto-poetino Ludmila Jevsejeva (1913-1980)” (aŭd. n-ro 2-08)
- 20.00 – 21.00** Koncerto de Mikaelo Bronštejn (Muzika lernejo)  
**21.00 – 22.00** Koncerto de Solotronik (Muzika lernejo)

## Zamenhof:

Instruante ni lernas.  
Kio estas lernita, tio ne estas perdita.  
Kiu mem ne penas, al li nenio venas.

## BET ESTAS TRADICIO GRAVA



Karaj gesamideanoj,

Kun plezuro mi sendas miajn plej varmajn kaj elkorajn salutojn al vi, partoprenantoj de la 49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj!

Ne senkaŭze Universala Esperanto-Asocio asignis siajn aŭspiciojn al BET-49. Kiel la numero montras, temas pri tradicio, kiu daŭras jam praktike dum du homaj generacioj. Apenaŭ eblas supertaksi la signifon, kiun BET havis kaj plu havas por nia movado en la baltaj ŝtatoj kaj siatempe ankaŭ pli vaste por la movado en aliaj landoj de la tiama Sovetio. Kvankam BET estas baltia laŭnome, nuntempe ĝi allogas partoprenantojn ankaŭ el diversaj aliaj landoj kaj kontribuas al la kleriga, kultura kaj organiza plifortiĝo de la tuta Esperanto-movado. Flanke de UEA mi esprimas profundan kontenton pri tio, esperante, ke tiu kontribuo de BET daŭros ankoraŭ ĝis fora estonteco.

Rigardo al la programo de BET-49 igas min bedaŭri, ke mi ne povas partopreni, ĉar tiel riĉa ĝi estas. Mi kore dankas al la Organiza Komitato pro la farita laboro kaj deziras al ĝi plenan sukceson ĉe la realigo de la programo kaj de aliaj organizaj taskoj.

Al vi, karaj partoprenantoj, mi deziras agrablan semajnon kun bela vetero kaj poste neforgeseblajn rememorojn pri BET-49 en Utena!

Osmo Buller  
Ĝenerala Direktoro de UEA

## LA URBA LUMMUZIKA FONTANO PRETAS

La urbanojn kaj partoprenantojn de BET-49 pretas ĝojigi la lumanta kaj muzikanta fontano en la lago *Dauniškis*. La unuhora programo estas prezentata dum ĵaŭdoj, sabatoj kaj festotagoj. La programa tempo: ekde 22.00 ĝis la 23.00. La fontano funkcios ankaŭ tage. Ekde 12.00 oni demonstros 15 minutan programon kun muziko, poste ekde 13.00 sonos unuminuta muzika programo.

La fontano estis inaŭgurita la 11-an de septembro 2011 dum la celebrado de la 750 jara jubileo de Utena – por ĝojo de ĉiuj celebrantoj!

## PRI BET EN LOKA GAZETARO

Jam la 5-an de julio 2013 la regiona gazeto “Utenos apskrities žinios” (Sciigoj de Utena regiono) sur la dua paĝo prezentas informon de la administraro de regiona komunumo subtitole “En Utena – la 49-aj esperantistaj baltiaj tagoj”. Estas prezentita programo de la aranĝo kaj la atentigo, ke la organizanto estas la samregionulo Povilas Jegorovas. La saman informon publikigis ankaŭ la urba gazeto “Utenos diena” sur la 5a paĝo.

### NIA INTERVJUO

**Povilas Jegorovas** la multjara prezidanto de Litova Esperanto Asocio, komitatano de UEA, ĉefdelegito de UEA estas ankaŭ ĉeforganizanto de BET-49 en Utena.

**Kiom da BET-oj vi organizis kaj kiu estis la unua el ili?**

La unua estis en 1979. La lasta estas ĉi tiu. Mi do organizis jam 12 BETojn!

**Kiuj el viaj BET-oj pro iu eksterordinaraĵo profunde eniris vian memoron?**

Estis la jaro 1989, kiam ni organizis BET apud Kaunas, en Agrikultura Akademio (nun Universitato). Tiam por ĉiu grava aranĝo, precipe por interrespublika estis bezona aprobo de komunistaj instancoj. Pri nia aranĝo la instancoj, certe, sciis. Sed permeso de ili mankis. Tri tagojn antaŭ la aranĝo oni diris al mi, ke ni ne rajtas organizi BET-on kaj proponis sendi telegramojn al aliĝintoj, ke BET ne okazos kaj ili ne venu. Tia ordono iris de Centra Komitato de Litova Komunista Partio. Mi ne obeis, mi diris, ke mi telegramojn ne sendos, ĉar multaj partoprenantoj jam ekveturis, precipe el Siberio ktp. Mono de ili jam estas ricevita kaj parte jam elspezita por diversaj organizaj aferoj. Kaj mi proponis al ili, se vi tiel decidis mi trandonos al vi la liston de partoprenantoj kun adresoj – sendu telegramojn vi de via nomo. Al tio oni promesis pripensi. Sekvan tagon oni telefonis al mi kaj diris: aranĝu, ni helpos. Kaj efektive, kelkaj gravuloj eĉ venis al la inaŭguro de BET! Estis tre nervozaj tagoj ...

**Kion vi esperas de ĉi tiu BET?**

Mi imagis, ke al BET iros pli multaj. Mirigis min, ke el la najbara Polando aliĝis nur du personoj. Sed gravas ne nombro, sed kvalito. En la programo estas multaj prelegoj, kelkgradaj kursoj. Mi esperas, ke la programo estos interesa por ĉiuj kaj precipe utila por novuloj. Mi devas substreki, ke ĉi tiu BET elstaras pro la plej bona kunlaboro kun lokaj municipoj. Ĉion kion ni petis de ili, ni ricevis. En Utena mi trovis multajn simpatulojn, havos multe da Amikoj de Esperanto. Unu el tiuj jam estas urbestro de Utena mem! Por mi tio speciale gravas, ĉar mi ja devenas de ĉi tiu distrikto. Ĝis mia naskiĝloko, la vilaĝo Jauniškiai ĉe Tauragnai estas nur 10 km de ĉi tie.

## PRELEGONTOJ DE BET-49

**Aleksander Korĵenkov**

prezentos sian kvinprelegan kurson “**Historio de Esperanto**”.

La Ruslanda ĵurnalisto, redaktoro kaj histori-esploranto Aleksander Korĵenkov estas unu el la plej konataj fakuloj pri la historio de Esperanto. Li multe laboris en arkivoj kaj bibliotekoj, kie li malkovris interesajn dokumentojn, kiujn oni ne konis pli frue. Surbaze de siaj esploroj Korĵenkov verkis multajn artikolojn (ili aperis plejparte en la revuo *La Ondo de Esperanto* kiun li mem redaktas), kelkajn librojn, interalie: *Esperanto post la jaro 2000* (1998), *Esperanto en Ruslando* (kune kun Halina Gorecka, 2000), *Historio de Esperanto* (2005; aperis ankaŭ serbe), *Homarano* (2009, 2a eldono 2011; aperis ankaŭ japane), *Zamenhof* (2010; aperis ankaŭ angle kaj slovake).

Ne laste pro sia historiista laboro Aleksander Korĵenkov ricevis la honoran titolon La Esperantisto de la Jaro 2009 kaj (kune kun sia edzino Halina Gorecka) iĝis laŭreato de la prestiĝa Esperanto-kulturpremio, kreita de la FAME-fondaĵo kaj la urbo Aalen (2010). Dum tri jardekoj Aleksander Korĵenkov prelegis pri diversaj temoj, ligitaj kun la historio de Esperanto kaj ties aŭtoro Ludoviko Zamenhof en pluraj landoj de la mondo: Ruslando, Litovio, Pollando, Slovakio, Germanio, Finnlando, Hispanio, Britio...

Sian kurson pri la historio de Esperanto li prezentis unuafoje en la Somera E-Kursejo (Jekaterinburg, aŭgusto 1998). Ĝi estis kompletigita en 2003 kaj en 2004 por la instruista seminario de Litova Esperanto-Asocio en Kaŭno kaj por la kurso “Historio de Esperanto” en la Interlingvistikaj studoj ĉe la universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano, kie Korĵenkov estas gast-profesoro pri la historio de Esperanto.

La prelega kurso estas koncizigita ĝis nur kvin unuhoraj lekcioj universitata kurso por studentoj, kiuj poste plenumas ekzamenon. Por la ĝenerala publiko Aleksander prezentos ĉi-jare en la 98a Universala Kongreso en Rejkjaviko. Sed la partoprenantoj de BET-49 en Utena havos la ŝancon viziti la kurson “Historio de Esperanto” de Korĵenkov du semajnojn antaŭ la Rejkjavika UK!

### La centa UK kaj kvindeka BET

La nordfranca urbo Lillo (Lille) gastigos la 100-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2015. Bela jubileo! Tiel decidis la Estraro de UEA. En kiu latva urbo okazos la 50-a BET? Pri tio espereble ni ekscios de la latvaj partoprenantoj de BET-49. 50-jaro ankaŭ elstaras, ĉu ne?!

**Petras Čeliauskas**

faros kvarprelegan ciklon “**Kelkaj faktoj pri la litovaj lingvo kaj kulturo**”

Elstara litova esperantisto, Honora Membro de UEA, tradukisto, multjara redaktoro de la revuo “Litova Stelo” Petras Čeliauskas estas pedagogo. En brava urbe-to Ŝvėkšna li instruis matematikon, astronomion, desegnadon. En la lernejo li tralaboris 43 jarojn. Pro historiaj esploradoj de sia urbeto kaj historiaj publikaĵoj li estis kelkfoje distingi-ta per diversaj gravaj premioj.

Kiam duonmonata prestiĝa litova revuo *Švyturys* (Lumturo) en 1957 aperigis kurson de Esperanto, Petras Čeliauskas memstare eklernis la interncian lingvon kaj baldaŭ komencis partopreni en Esperanto-agado.

Ekde la jaro 1975 P. Čeliauskas partoprenas en BET-oj. Li aktive partoprenis en 20 BEToj, legis tradukojn de litova poezio kaj prelegis pri litovaj lingvo kaj historio, ankaŭ pri esperantologiaj temoj.

P.Čeliauskas elstaras ankaŭ kiel tradukisto. Ekz., li tradukis la poemojn *Arbaro de Anykščiai* de Antanas Baranauskas, *Piceo, la reĝino de kolubroj* de Salomeja Nėris, *Juratė kaj Kastytis de Maironis*. Petras Čeliauskas esperantigis ĉirkaŭ 60 versaĵojn de 24 litovaj poetoj, fragmentojn el la poemo *Konrad Walenrod* de ŝatata en Litovio poeto Adam Mickiewicz. Li tradukis litovajn popolkantojn al Esperanto, kaj verkis en la litova popolarsciencan studon pri lingvoevoluo “De Babelo ĝis Esperanto”.

Preskaŭ 30 esperantologiaj artikoloj en diversaj E-eldonaĵoj, pli ol 30 artikoloj pri historio, kulturo kaj literaturo de Litovio estis aperigitaj en la revuo *Litova Stelo*.

### ESPERANTO EN LITOVAJ RETEJOJ

Litova prihistoria gazeto *Voruta*, Nr. 12 (776) 2013.06.08 atentigis pri 85-jara jubileo de evangelika pastro, esperantisto **Erikas Laiconas**. Li estis sperta esperantisto kaj aktive partoprenis en multaj BET-oj. Li naskiĝis 11.06.1928, mortis 28.01.2008. La informon aperigis ankaŭ la retejo de la gazeto *Voruta*: [http://www.lks.lt/pdf/VORUTA/voruta\\_2013\\_12.pdf](http://www.lks.lt/pdf/VORUTA/voruta_2013_12.pdf)

La 30-an de majo 2013 forpasis unu el komen-cintoj de litova sporta medicino, elstara pedagogo d-ro Kostas Labanauskas. Li ŝatis filatelon, kantadon, bone scipovis kvin fremdajn lingvojn kaj estis aktiva espe-rantisto. Tiujn ĉi informojn prezentis la retejo <http://kauno.diena.lt/dienrastis/priedai/sveikata/nuluzo-azuolas-stovejes-prie-sporto-medicinos-lopsio-500225>

La prezentitaj retejaj informoj akcelas ĉiujn esperantistojn: ne kaŝu, sed ĉian demonstren vian esperantisticon!

## LA SANKTA MESO EN ESPERANTO

En la urba preĝejo de Kristoflugo en la Ĉielon la 7-an de julio (dimanĉo) je la 19-a horo la pastroj Marius Dyglys, Lionginas Vaičiulionis, Maris Laureckis celebros ekumenan meson en la lingvo Esperanto.

## Vokas la Libera Esperanto-Kantaro

Kiel rezulto de multjara agado, en la vikia kantaro troveblas jam tekstoj de 3000 Esperanto-kantoj! Iniciatinto, ĉefa laboranto kaj multjara motoro de la projekto estas Aleksej (Ljoŝa) Kuznecov el Rusio, [ka2pink@gmail.com](mailto:ka2pink@gmail.com).

La adreso de la eksterordinara kantaro estas: <http://kantaro.ikso.net/>. Tie vi trovos kolekton de kantoj en Esperanto kaj ĉion, kio rilatas al ili: nome tekstojn, notojn, ligojn al e-muziko en Interreto, kaj espereble eĉ pli multe.

En kreado de la kantaro partoprenis/as: (AVO), Bert Schumann, Boris Kolker, Carlos Bianchini, Clayton Smith (Argilo), Die Weicherts (Diana), Szilvási László (Eventoj), Floreal Martorell (Flo), (Fringo), Georgij Kokolija, Gunnar R. Fischer (DJ Kunar), Grigorij Arosev, Hokan Lundberg, Jevgenij Gaus, Michal "KuboF" Matúšov, Manuel Pancorbo, MÉSZÁROS István (Pista), Ricardo Dias Almeida, Roĝer Borĝes, Slavik Ivanov, Aleksej Kuznecov kaj multaj aliaj neregistriĝintaj geamikoj.

Gratulojn kaj sincerajn dankojn al ili kaj speciale al Alekseo Kuznecov!

## ATENTIGO

1. La anoncita manĝejo-kafejo *Irmusta* ĉe Studenta domo Nr.1 ne funkcios, eblos viziti manĝejon-bierejon *Seklyčia* (Maironio g Nr.2, lauvoje de la Studenta domo al Utena Kolegio) kiu funkcias ĉiutage krom dimanĉo ĝis la 18-a. La manĝejo prezentas kelkaj specojn da biero, kvason kaj diversajn varmajn manĝaĵojn.

2. La organiza komitato laŭbezzone povas ŝanĝi la anoncitan programon. La ŝanĝojn, informojn pri la salonoj ktp. serĉu ne nur en la ĉiutaga gazeto *Heroldo de Utena*, sed ankaŭ sur anonctabulo en la vestiblo.

## ANONCOJ

**Komputilejo** por ĉiuj BET-anoj funkcios en la ĉambro 2-06 sur la 2-a etaĝo (iri dekstren).

**La urbestra akcepto** por reprezentantoj de BET okazos la 9-an de julio (marde) en la kafejo *Abu* (Ambaŭ) je la 18-a. Je la 17.45 estos buso.

**Redaktorejo de la gazeto *Heroldo de Utena*** troviĝas en la aŭditorio n-ro 2-13 (sur la 2-a etaĝo, maldekstren).

**Kiu perdis la paciencon** legi ĉi tiun gazeton, anoncu vin sur la tabulo – eble iu trovis vian paciencon.

**Premio** – kiso, ĉirkaŭpreno aŭ manpremo (laŭlekte) de la redaktoro: trovu preseraron en eldonita ĉi tiu numero! La edzino ne kontraŭos.

## ŜERCE KAJ IRONIE

## Turismo

Al turisma agentejo venas kliento. Sekvas la interparolo:

- Mi estas esperantisto kaj deziras per via agentejo veturi al Francio. Ĉu viaj ĉiĉeronoj bone parolas Esperanton?

- Kompreneble! Kaj ne nur. En francaj hoteloj, restoracioj kaj muzeoj la personaro bonege priservas nin en Esperanto!

- Ĉu vi ŝercas?

- Vi la unua komencis!

## La angla aŭ lumo subtere

Mi aŭdis: baldaŭ ĉiuj parolos nur angle. Plorante mi metas la Fundamenton kaj PIV en keston kaj fosas tion sub pomujon. Post multaj jaroj, kiam oni ne plu parolos angle (eble ĉine) mi elfosos la keston. Kaj parolos kun mi mem en Esperanto!

## Kiu legu en Esperanto?

Kial ni malofte legas librojn? Vi respondos (laŭ Julio Baghi): librojn legu la verkistoj (mem!). Tiom da libroj estas. Milfoje pli multe ol da vivaj verkistoj! Decidiĝu, prenu libron! Vi ne tralegos ĉiujn librojn. Tamen. Povas esti en tiu libro, kiun vi ne tralegis eble kuŝas la vortoj, kiuj povas ŝanĝi vian vivon ...

## Zamenhof:

Plej bone ridas, kiu laste ridas

## Vetera prognozo

Por la 8-a de julio (lundo)

Parte nubaj sed senpluvaj, parte serenaj mateno, tago, vespero. Temperaturo tage + 24-27°C

Verku kaj fotu por *HdeU*!

Redaktoro

Vytautas Šilas,

+370 611 75500

[vilnastelo@yahoo.lt](mailto:vilnastelo@yahoo.lt)